BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy
Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Redakce a administrace: Praha III, Kampa 495.

Redaktor: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097.

Vydavatel: Jan Iglauer, Praha III, Hroznová 6.

ROČNÍK IV SEŠIT 12

PRAHA, 30. IX. 10. Cena 36 h

Zásilky pro „S. č. e.“ adresujte: Mil. Schmidt, Praha-II. 1036/XIV.

Celoroční předplatné 4·— K.

Český esperantista-Bohema esperantisto

(*Red. kaj adm.:* Praha III, Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio; *Jarabono* Sm 1·70) monata revuo por propagandado de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de **„Bohema asocio esperantista“** (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 20-an de ĉiu monato en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj.

La manuskriptoj, leteroj, libroj kaj gazetoj estu sendataj al la redakcio, la abonpago al la administracio. Ĉiuj verkoj en kiu ajn lingvo ricevitaj de la redakcio estas registrataj; recenzoj estas publikigataj pri la verkoj ricevitaj almenaŭ en du ekzempleroj. La redakcio rezervas al si la rajton korekti la manuskriptojn. Represo kaj traduko, se ili ne estas speciale rezervitaj, estas permesataj, se oni citas nian revuon kaj sendas 3 ekzemplerojn al la redakcio. La redakcio respondas la leterojn sole per la gazeto, ne per la poŝto; kiu bezonas rapidan respondon letere, aldonu poŝtmarkon. Specimenon oni sendos kontraŭ unu respondkupono.

Z administrace. Číslem tímto končíme IV. ročník Č. E. Poněvadž vzdor všemu upomínání mnozí naši pp. předplatitelé dosud předplatné nezaplatili, upozorňujeme n a p o s l e d y, že pakli dlužné předplatné nebude nám b ě h e m 8 d n ů zasláno, bude vymáháno p r á v n í c e s t o u. Kdo ušetřiti si chce nepříjemností a zbytečných vydání, nechť nám předplatné ihned zašle.

Kompletní ročníky zasíláme pokud z á s o b a stačí po K 3·—. Členové Svazu aneb klubů ve Svazu sdružených, mají přiměřenou slevu.

Uzavírajíce ročník, děkujeme našim přátelům a příznivcům za ochotu, jíž se nám hojně dostalo. Administrace ani redakce nepracuje za hmotným účelem, neboť finanční úspěch našeho listu není takový, aby práce nějaká mohla býti honorována, avšak i to jest nám odměnou, když vidíme, že práce naše nezůstává bez morálního úspěchu.

Ze Svazu Č. E. Mnozí pp. členové vrátili nám číslo Č. E., čímž domnívají se, že tím z klubu vystoupili. Poněvadž stanovy naše přesně označují, že vystoupení z klubu musí se státi písemným oznámením, nemůžeme pouhé vrácení čísla jako vystoupení z klubu považovati. Dle naší smlouvy s nakladatelstvím Č. E. dodávání Č. E. může přerušeno býti jen při ukončení I. neb II. pololetí, proto každý vystupující člen mimo ukončené pololetí jest povinen za každé načaté pololetí zapraviti členský příspěvek.

Pp. členové upozorňují se, že n o v ý s p r á v n í r o k započal již 1. č e r v e n c e t. r. K zapravení členského příspěvku přiložena jest k dnešnímu číslu složenka. Legitimace členská a premie zasílá se po úplném zaplacení členského příspěvku. J a n I g l a u e r, t. č. pokladník.

Esperantská korrespondence — Esperanta korespondado.

Jednonásobné otištění oznámení stojí 60 h., trojnásobné K 1·50. Členové svazu a spolků sdružených platí pouze 40 hal., resp. 1 K. Pro přímé předplatitele je prvé otištění zdarma. — Vyměňovati dopisy¹), pohlednice²), pošt. známky³), přejí si:

La unufoja enpreso de l' anonco kostas 25 sd. trifoja 63 sd. La anoj de l' asocio kaj aliĝintaj societoj pagas sole 17 sd, resp. 42 sd. Por la abonintoj la unua enpreso estas s e n p a g a.— Interŝanĝonde leteroj¹), ill. poŝtkartoj²), poŝtmarkoj³) deziras:

84. V á c l a v V á ň a, komerca vojaĝisto en Mšeno, apud Mělník, Bohemujo ¹) ²) ³). — 85. K a r l o T u č e k en Praha III. 520, Bohemujo, deziras korespondati pri spiritismo, okultismo kaj theosofismo. — 86. B. V a n d e r H o l k, Boterbrug 5 Delft., Holandujo ¹) ²). — 87. J u a n A m a d e s, Pou Creu 10, Tda Barcelona. Li ankaŭ intеŝanĝas esper. gazetoj ĉefe malnov. — 88. C h a r l e s A n d e r s e n Dr., Loisgade 28. Thisted, Danujo. — 89. F-ino H. F i g u e r o l a, Montserrat 20, Sabadello Hispanujo.

VÝZNAM ESPERANTA PRO ČECHY A SLOVÁKY.

Napsal *Jos. Krumpholc.* — (Dokončení.)

Bohužel, kraje a lázně české nemají z těchto statisíců cizinců téměř nic. A co toho příčinou? — Jednak naše nepodnikavost a nedostatečná reklama, naše špatná pověst v cizině, jako bychom byli národ méně kulturní, ne-li nekulturní, mezi nímž pobyt nebo život jest, ne-li nebezpečným, tedy nemožným pro nesmluvitelnost s cizinci a cizinců s námi. Nikdo nepoukazuj na naši němčinu; ta ve styku s Francouzi, Angličany, Američany a j. nestačí.

A této nesnázi odpomoci neb alespoň ji zmírniti lze nejsnáze a nejrychleji esperantem — jazykem to úžasně snadným, i lidu lehce přístupným a výborně se osvědčivším už na šesti světových kongresech mezinárodních, jichž účastnilo se pomocí esperanta na 40 různých národů.

Snaha povznésti cizinecký ruch i u nás, má však nejen velký význam hospodářský, ale i kulturní a mravní.

Jeť pochopitelno, že cizinec vytříbenějšího vkusu a vyšších nároků podněcuje zvýšenými požadavky svými zušlechtění a tedy pokrok výrobků našich a způsobu života (zejména bydlení), a že kromě toho povznesením návštěvy cizinecké u nás rozmnoží se podle Carlyle i počet přátel a zastanců našich, kteří včas potřeby ochotně zajisté a účinně, poněvadž z vlastní zkušenosti, zastanou se cti naší, pokud jí zasluhujeme a ještě si zasloužíme.

A že i bratřím našim uherským povznesení návštěvy cizinecké na Slovensku bylo by jen ku prospěchu, kdož by o tom pochyboval, uváží-li, že vzrůstem různojazyčných turistů na Tatrách a v Pováží a hostů lázeňských v Píšťanech, Trenč. Teplicích, Štubni atd. zmenší se dosavadní poměr návštěvníků maďarských, kteří pak přirozeným vývojem poměrů a užíváním esperanta ve styku s cizinci přestanou býti průkopníky a šiřiteli maďarisace a zůstanou jen přinašiteli peněz, jako jsou v jiných místech: ve Švýcarsku, Rivieře atd.

Ale aby se tak stalo, k tomu nezbytně je třeba, aby esperanto i na Slovensku se rozšířilo.

Rozumí se, že co řečeno o omezení maďarisace povznesením návštěvy cizinecké, resp. rozšířením esperanta na Slovensku, platí obdobně i o germanisaci v krajích a lázních našich, v obchodě a všude.

A tak vidíme, že význam esperanta zvláště pro nás Čechy a Slováky a vůbec malé a menší národy jest tak veliký a vážný, ne-li přímo životní, že nebojíme se skončiti slovy, jakýmiž Komenský svou Didaktiku uzavíral: O krajané přemilí, nebuďme zpozdilí k věci tak ušlechtilé, a k čemu máme oči, že co býti má, vidíme, mějme i srdce a ujměme se toho opravdově!

LA PATRIOTISMO KAJ REGISTARO.

Verkis *L. N. Tolstoj.* El la rusa lingvo tradukis *A. Blindkopf.*

(Fino.)

VI.

Efektive, kio estas niatempe la registaroj, sen kiuj al la homoj ŝajnas neeble ekzisti?

Se estis la tempo, kiam la registaroj estis necesaj kaj malpli granda malbono ol tiu, kiun kaŭzadis sendefenditeco kontraŭ organizitaj najbaroj, do nun la registaroj fariĝis senbezonaj kaj multe pli granda malbono ol ĉio tio, per kio ili timigas siajn popolojn.

La registaroj ne sole militaj, sed registaroj entute, povus esti, mi jam ne diras — utilaj, sed senmalutilaj, sole en la okazo, se ili konsistus el nepekeblaj, sanktaj homoj, kiel ĝin antaŭsupozas Ĥinoj. Sed la registaroj ja laŭ sia agado mem, konsistanta el farado de la perfortoj, konsistas el la elementoj plej malaj al sankteco, el la plej arogantaj, maldelikataj kaj malbonigitaj homoj.

Tial ĉiu registaro, kaj des pli la registaro, al kiu estas lasita militpotenco, estas terura, la plej danĝera en la mondo institucio.

La registaro, en la plej larĝa senco, kalkulante en ĝin eĉ kapitalistojn kaj gazetaron, estas ne io alia ol tia organizaĵo, en kiu la pli granda parto de l' homoj sin trovas sub potenco de la pli malgranda parto staranta super ili; ĉi tiu do pli malgranda parto obeas la potencon de l' ankoraŭ pli malgranda parto, kaj tiu ĉi lasta — de ankoraŭ pli mal-

granda k. t. p., alirante fine, ĝis kelkaj homoj aŭ ĝis unu homo, kiuj per la milita perforto ricevas la potencon super ĉiuj ceteraj. Tiel tiu ĉi tuta konstruaĵo similas la konuson, kies ĉiuj partoj troviĝas sub plena potenco de tiuj personoj aŭ de tiu persono, kiu sin trovas sur ĝia pinto.

Do la pinton de tiu ĉi konuso kaptas tiuj homoj aŭ tiu homo, kiuj estas pli ruzaj, pli arogantaj kaj malhonestaj ol la aliaj, aŭ okaza heredanto de tiuj, kiuj estis pli arogantaj kaj malhonestaj.

Hodiaŭ*) — Boris Godunov, morgaŭ Grigorij Otrepjev, hodiaŭ — malĉasta Katarino, sufokinta kun helpo de siaj amistoj la edzon, morgaŭ — Pugaĉov, post morgaŭ — freneza Pavlo.

Hodiaŭ — Napoléono, morgaŭ — Bourbonano aŭ d' Orleans, Boulanger aŭ anaro de panamistoj; hodiaŭ — Gladstone, morgaŭ —Solsberi, Chamberlaine, Rodes.

Kaj jen al tiaj do registaroj estas donata plena potenco ne sole super la havaĵo, vivo, sed eĉ super la spirita kaj moralo disvolviĝo, super edukado, religia gvidado de ĉiuj homoj.

Oni konstruis al si tian teruran maŝinon de l' potenco, lasante kaptadi ĉi tiun potencon al iu ajn (do ĉiuj ŝancoj estas por tio, ke kaptos ĝin la morale plej malbona homo) kaj sklave humilas kaj miras, ke al ili estas malbone. Ili timas minojn, antikristojn, kaj ne timas ĉi tiun teruran konstruaĵon, ĉiuminute minacantan ilin per la plej grandaj malfeliĉoj.

La homoj trovis, ke por defendadi sin kontraŭ malamikoj, estas utile sin ligi al ili, kiel tion ĉi faras sin defendantaj Ĉerkesoj. Sed jam estas nenia danĝero, kaj tamen la homoj daŭrigas sin ligadi.

Peneme ili kunligas sin tiel, ke unu homo povu al ili ĉiuj fari ĉion, kion li volos; poste — la finaĵon de la ŝnuro liganta ilin, lasas ilin balanciĝi, ebligante al iu ajn malsaĝulo aŭ sentaŭgulo kapti ĝin kaj fari al ili ĉion, kion li bezonas.

Ja kion do, se ne tion ĉi saman faras la popoloj, humilante, enkondukante kaj subtenante la registarojn organizitajn kun militpotenco.

VII.

Por liberigi la homojn de tiuj teruraj mizeroj, enarmiĝoj kaj militoj, de kiuj ili suferas nun kaj kiuj ĉiam pli kaj pli grandiĝas, bezonaj estas ne kongresoj, ne konferencoj,

*) Tiun ĉi pinton okupas. *Aldono de l' trad.*

ne traktadoj kaj juĝejoj, sed neniigo de tiu ilo de l' perforto, kiu estas nomata registaroj, kaj de kiu venas la plej grandaj malfeliĉoj de l' homoj.

Por neniigo de l' registaroj estas bezona sole unu: estas bezone, ke la homoj komprenu, ke tiu sento de patriotismo, kiu sola subtenas ĉi tiun ilon de la perforto, estas sento maldelikata, malutila, hontinda kaj malbona, do ĉefe — kontraŭmorala. Maldelikata sento ĝi estas tial, ke ĝi apartenas sole al la homoj starantaj sur la plej malalta ŝtupo de moralo, atendantaj de aliaj popoloj tiujn samajn perfortojn, kiujn ili mem estas pretaj fari al ili; malutila sento — ĉar ĝi detruas utilajn kaj ĝojajn pacajn rilatojn kun aliaj popoloj kaj, ĉefe, faras tiun organizaĵon de l' registaroj, ĉe kiu la potencon povas ricevi kaj ĉiam ricevas la plej malbona; hontinda sento — ĉar ĝi ŝanĝas la homon ne sole en sklavecon, sed en batalan kokon, bovon, gladiatoron, kiu pereigas siajn fortojn kaj vivon por celoj ne siaj, sed de sia registaro; sento kontraŭmorala — ĉar anstataŭ opinii sin filo de Dio, kiel la kristaneco nin instruas, aŭ almenaŭ libera homo, sin gvidanta per sia prudento — ĉiu homo, sub influo de l' patriotismo, opinias sin filo de sia patrujo, sklavo de sia registaro, kaj faras agojn malajn al sia prudento kaj sia konscienco.

Sufiĉas al la homoj kompreni ĉi tion, kaj per si mem sen batalo disfalos la terura kunplektaĵo de l' homoj, nomata la registaro, kaj kune kun ĝi — tiu terura, senutila malbono, kaŭzata de ĝi al la popoloj.

Kaj la homoj jam komencas kompreni ĉi tion. Jen kion skribas, ekzemple, regnano de Nord-Amerikaj ŝtatoj:

— »La sola, kion ni petas ĉiuj — terlaborantoj, meĥanikistoj, komercistoj, fabrikantoj, instruistoj — estas rajto — nin okupadi je niaj propraj aferoj. Ni havas niajn domojn, amas niajn amikojn, estas aldonitaj al niaj familioj kaj ne enmiksiĝas en aferojn de niaj najbaroj, ni havas laboron, kaj ni deziras labori.«

»Lasu nin en trankvilo!«

»Sed la politikuloj ne volas nin lasi. Ili metas sur nin la impostojn, formanĝas nian havon, enskribas nin, alvokas nian junularon al siaj militoj.«

»La tuta miriado de l' vivantoj per regna kaso dependas de regno, estas pensiataj de ĝi por metadi sur nin la impostojn; do por metadi sukcese, estas tenataj la konstantaj armeoj. La argumento, ke armeo estas bezona por defendadi la landon, — estas evidenta trompo. Franca regno timigas

la popolon, parolante, ke Germanoj volas ataki ĝin; Rusoj timas Anglojn; Angloj timas ĉiujn; kaj nun en Ameriko oni parolas al ni, ke estas bezone pligrandigi la ŝiparon, plimultigi armeon, ĉar Eŭropo ĉiumomente povas unuiĝi kontraŭ ni. Tio estas trompo kaj malvero. Simpla popolo en Francujo, Germanlando, Anglujo kaj Ameriko — estas kontraŭ la milito! Ni deziras sole, ke oni lasu nin en trankvilo. La homoj, havantaj la edzinojn, gepatrojn, infanojn, domojn — ne havas la deziron foriradi por batali kun iu ajn. Ni estas pacamaj kaj ni timas la militon, malamas ĝin.«

»Ni volas sole ne faradi al la aliaj tion, kion ni ne volus, ke ili al ni faru.«

»La milito estas nepra sekvo de ekzistado de l' enarmigitaj homoj. La lando, tenanta grandan konstantan armeon, frue aŭ malfrue militos. La homo, fieranta je sia forto en pugna batalo, iam renkontos la homon, kiu opinias sin pli bona batalanto, — kaj ili batiĝos. Germanlando kaj Francujo sole atendas la okazon provi unu kontraŭ alia siajn fortojn. Ili bataladis jam kelkfoje kaj batalos ree. Ne estas tio, ke ilia popolo deziras la militon, sed la plej alta klaso ekflamigas en ili reciprokan malamon kaj igas la homojn pensi, ke ili devas militi por sin defendadi.«

»Sur la homojn, kiuj volus sekvi la instruon de Kristo, oni metas impostojn, oni ilin ofendas, trompas kaj entiras en militojn.«

»Kristo instruis humilemon, kvietecon, pardonadon de l' ofendoj kaj tion, ke mortigadi estas malbone. La Sankta Skribo instruas al la homoj — ne ĵuri, sed »la plej alta klaso« igas nin ĵuri per la Sankta Skribo, kiun ĝi mem ne konfidas.«

»Kiel do ni povas liberiĝi de tiuj ĉi malŝparuloj, kiuj ne laboras, tamen estas vestitaj en delikata drapo kun kupraj butonoj kaj karaj ornamoj, kaj kiuj nutriĝas per niaj laboroj, por kiuj ni prilaboras la teron?«

»Batali kun ili?«

»Sed ni ne allasas la sangelverŝojn, kaj, krom tio, ili havas armaĵon kaj monon, kaj ili eltenos pli longe ol ni.«

»Sed el kiu konsistas tiu armeo, kiu militos kontraŭ ni?«

»Ĉi armeo konsistas el ni mem, el niaj trompitaj najbaroj kaj fratoj, kiujn oni certigis, ke ili servas al Dio, defendante sian landon antaŭ malamikoj. En efektivo do, nia lando ne havas malamikojn, krom la plej alta klaso, kiu prenis sur sin la devon zorgi niajn interesojn, se ni konsent-

ados pagi la impostojn. Ili elsuĉas niajn rimedojn kaj starigas niajn verajn fratojn kontraŭ ni por sklavigi kaj malaltigi nin.«

»Vi ne povas sendi telegramon al via edzino aŭ via amiko, aŭ ĉekon al via liveranto, ĝis vi pagos la imposton prenatan por tenado de l' enarmigitaj homoj, kiuj povas esti uzitaj por mortigi vin kaj kiuj sendube enmetos vin en malliberejon, se vi ne pagos.«

»La sola savo estas: pensigi la homojn, ke la mortigo estas malbono, instrui al ili, ke »la tuta leĝo kaj profetoj« estas en tio, ke ĉiu faru al la aliaj tion, kion li volas, ke aliaj al li faru. Silente malŝatu ĉi tiun plej altan klason, rifuziĝu adoradi ilian militeman idolon. Ĉesu subtenadi la predikantojn, kiuj predikas la militon kaj elstarigas la patriotismon kiel ion gravan.«

»Ili iru labori, kiel ni.«

»Ni konfidas Kriston, do ili — ne. Kristo parolis tion, kion li pensis; ili parolas tion, per kio ili esperas plaĉi al la homoj havantaj potencon — al »la plej alta klaso«.«

»Ni ne estos militsarvantaj. Ni ne pafos laŭ ilia ordono. Ni ne armiĝos per bajonetoj kontraŭ la bona, kvieta popolo. Ni ne pafos laŭ volo de Cecile Rodes la paŝtistojn kaj terlaboristojn, kiuj defendas siajn hejmojn.«

»Via falsa krio: »lupo, lupo!« ne timigos nin. Ni pagas viajn impostojn sole tial, ke ni estas devigataj fari tion ĉi. Ni pagos sole dum ni estas devigitaj ĉi tion fari. Ni ne pagos ekleziajn impostojn al hipokrituloj, nek la dekonon de via hipokrita bonfarado, kaj ni en ĉiu okazo eldirados nian opinion.«

»Ni edukados la homojn.«

»Kaj la tutan tempon nia silenta influo estos disvastiĝanta: kaj eĉ la homoj, jam rekrutitaj kiel soldatoj, ŝanceliĝados batali. Ni enigados la penson, ke la kristana vivo en paco kaj bonvolemo estas pli bona ol la vivo de batalo, de sangelverŝado kaj milito.«

»La »paco sur la tero!« — povas komenciĝi nur tiam, kiam la homoj forigos de si la armeojn kaj deziros fari al la aliaj tion, kion ili volas, ke la aliaj al ili faru.«

Tiel skribas la regnano de Nord-Amerikaj Ŝtatoj; kaj de diversaj flankoj, en diversaj formoj eksonas la samaj voĉoj.

Jen kion skribas germana soldato:

— »Mi faris du militirojn kune kun la prusa gvardio (1866—1870 j.) kaj malamas la militon el profundo de l' animo, ĉar ĝi faris min neesprimeble malfeliĉan. Ni, la vund-

itaj milituloj, ricevas plejparte tian mizeran rekompencon, ke ni devas, efektive, honti pro tio, ke iam ni estis patriotoj. Mi ekzemple, ricevas ĉiutage 40 kopekojn*) por mia trapafita dekstra mano la 18^{an} de aŭgusto de jaro 1870. Al iu ĉashundo estas bezone pli multe por ĝia vivo. Kaj mi suferis tutajn jarojn de mia duoble trapafita dekstra mano. Jam en la jaro 1866 mi partoprenis je milito kontraŭ Aŭstrio, batalis apud Trutnov kaj Hradec Králové kaj vidis tre sufiĉe da teruraĵoj. En jaro 1870 mi, kiel troviĝinta en rezervo, estis alvokita denove kaj, kiel mi jam diris, estis vundita: mia dekstra mano estis trapafita dufoje laŭlonge. Mi perdis la bonan lokon (mi estis tiam bierfaristo) kaj poste jam ne povis rericevi ĝin. De tiu tempo mi jam neniam prosperis stariĝi sur piedoj. La ebrieco baldaŭ distriĝis, kaj al la maljuna militulo restis sole nutriĝi per malmultaj groŝoj kaj almozdonoj . . .«

»En la mondo, kie la homoj kuradas kiel dresitaj bestoj kaj estas kapablaj al neniu alia penso ol superruzi unu la alian pro »mamono«, en tia mondo oni opiniu min strangulo, sed mi tamen sentas en mi la diecan penson pri la paco, — penson, kiu estas tiel bele esprimita en la surmonta prediko. Laŭ mia plej profunda konvinko, la milito estas sole komerco en grandaj mezuroj, — komerco de l' honoramaj kaj potencaj homoj per la feliĉo de l' popoloj.«

»Kaj kiajn teruraĵojn oni travivas ĉe tio ĉi! Neniam mi forgesos ilin, ĉi tiujn lugubrajn ĝemojn, penetrantajn ĝis la cerbo de l' ostoj.«

»La homoj, neniam kaŭzintaj unu al la alia malbonon, mortigas unu la alian, kiel sovaĝaj bestoj, kaj malprofundaj, sklavaj animoj enmiksas bonan Dion kiel helpanton en ĉi tiuj faroj.«

Al mia najbaro en batalvico la kuglo dispecetigis la makzelon, Malfeliĉa, li freneziĝis de l'doloro. Li kuradis, kiel frenezulo kaj en brula somera varmego ne trovis eĉ akvon por freŝigi sian teruran vundon. Nia estro, la kronprinco Fridrich (poste — nobla imperiestro Fridrich) skribis tiam en sia taglibro: »ha milito, — ĝi estas ironio je la evangelio . . .«

La homoj komencas kompreni tiun trompon de l' patriotismo, en kiu tiel diligente penas teni ilin ĉiuj registaroj.

VIII.

»Sed kio do estos, se ne estos la registaroj?« — oni parolas ordinare.

---

*) ĉirkaŭ 40 spesdekoj. *Rim. de l' trad.*

— Nenio estos; estos sole tio, ke malaperos tio, kio jam delonge estis senbezona kaj tial superflua kaj malbona; malaperos tiu organo, kiu, iĝinte senbezona, fariĝis malutila.

»Sed, se ne estos la registaroj, — la homoj perfortados kaj mortigados unu la alian,« — oni parolas ordinare.

— Kial? kial la neniigo de tiu organizaĵo, kiu aperis en sekvo de la perforto kaj laŭ tradicio estis transdonata de generacio al generacio por farado de la perforto, — kial la neniigo de tia organizaĵo perdinta la uzon faros tion, ke la homoj perfortados kaj mortigados unu la alian? Ŝajnus, male, ke la neniigo de l' organo de la perforto faros tion, ke la homoj ĉesos perfortadi kaj mortigadi unu la alian.

Nun estas la homoj, speciale edukataj, pretigataj por mortigadi kaj perfortadi aliajn homojn, — la homoj, al kiuj oni lasas la rajton perfortadi kaj kiuj uzas organizaĵojn aranĝitan por tio ĉi kaj tia perfortado kaj mortigado estas opiniata, kiel virta kaj bona afero. Tiam do la homoj ne estos edukataj por ĉi tio; neniu havos la rajton perfortadi la aliajn, ne estos la organizaĵo de la perforto, kaj, kiel ĝi konformas al la homoj de nia tempo, la perforto kaj mortigo estos ĉiam kaj por ĉiuj opiniataj kiel malbona afero.

Do, se eĉ post neniigo de l' registaroj okazados la perfortoj, evidente estas, ke ili estos pli malmultaj ol tiuj, kiuj okazas nun, kiam ekzistas la speciale por farado de la perforto aranĝitaj organizaĵoj kaj situacioj, en kiuj la perforto kaj mortigo estas opiniataj, kiel bona kaj utila afero.

La neniigo de l' registaroj sole neniigos laŭ tradicio transirantan, senbezonan organizaĵojn de la perforto kaj ĝian pravigon.

»Ne estos la leĝoj, nek propraĵo, nek juĝoj, nek polico, nek popola klerigado,« — oni parolas ordinare, intence kunmiksante la perfortojn de l' potenco kun diversaj agadoj de l' socio.

La neniigo de l' organizaĵo de registaroj, aranĝitaj por farado de la perforto super la homoj, neniel sekvigas post si neniigon de tio, kio estas prudenta kaj bona kaj tial neperforta en la leĝoj, juĝo, propraĵo, policaj defendoj, financinstitucioj, popola klerigado. Male, la foresto de l' maldelikata potenco de la registaroj, havantaj celon subteni sole sin, akcelos pli prudentan kaj justan socialan organizaĵon, ne bezonantan la perforton. Kiel la juĝo, tiel sociaj aferoj kaj popola klerigado, — ĉio ĉi estos en tia mezuro, en kia ĝin bezonas la popoloj, kaj en tia formo, kia ne enhavos la

malbonon kunigitan kun nuna registara organizaĵo; neniiĝos sole tio, kio estis malbona kaj malhelpadis la liberan elmontron de volo de l' popoloj.

Sed se eĉ allasi, ke ĉe foresto de l' registaroj fariĝos ribeloj kaj internaj bataloj, do eĉ tiam la situacio de l' popoloj estus pli bona ol ĝi estas nun. La situacio de l' popoloj nun estas tia, ke la plimalbonigon de ĝi oni malfacile povas al si prezenti. La tuta popolo estas malriĉigita kaj la malriĉiĝo neeviteble devas iri pliiĝante. Ĉiuj viroj turniĝis en militaj sklavoj kaj ĉiuminute devas atendi l' ordonon — iri mortigadi kaj esti mortigataj. Kion do ankoraŭ atendi? Tion, ke la malriĉigitaj popoloj elmortadu per malsato? Tio ĉi jam komenciĝas en Rusujo, Italujo kaj Hindujo. Aŭ tion, ke, krom la viroj, oni kaptadu kiel soldatojn ankaŭ la virinojn? En Transvaalo eĉ tio ĉi jam komenciĝas.

Tiel, se eĉ efektive la foresto de l' registaroj signifus anarĥion en negativa, senorda senco de ĉi vorto (kion ĝi tute ne signifas), do eĉ tiam neniuj senordoj de l' anarĥio povus esti pli malbonaj ol tiu situacio, ĝis kiu la registaroj jam alkondukis siajn popolojn kaj al kiu ili kondukas ilin.

Kaj tial ne povas ne esti utila por la homoj la liberiĝo de l' patriotismo kaj la neniigo de la despotismo de l' registaroj fondanta sin sur ĝi.

IX.

Rekonsciiĝu, homoj, kaj pro la tuta bono — kiel korpatiel spirita — kaj pro sama bono de viaj gefratoj, haltu, rememoriĝu, ekpensu pri tio, kion vi faras!

Rekonsciiĝu kaj komprenu, ke viaj malamikoj estas ne Boeroj, ne Angloj, ne Francoj, ne Germanoj, ne Ĉeĥoj, ne Finnlandanoj, ne Rusoj, sed — viaj malamikoj, solaj malamikoj estas vi mem, subtenantaj per via patriotismo la registarojn, subpremantajn vin kaj farantajn al vi malfeliĉojn.

Ili prenis sur sin la devon defendadi vin kontraŭ la danĝero kaj alkondukis ĉi tiun falsan situacion de l' defendado ĝis tio, ke vi ĉiuj iĝis soldatoj, sklavoj, ĉiuj estas malriĉigitaj, ĉiam pli kaj pli malriĉiĝas kaj ĉiuminute vi povas kaj devas atendi, ke la streĉita kordo krevos, komenciĝos terura mortigado de vi kaj de viaj gefiloj.

Kaj kiel ajn granda estos la mortigado kaj per kio ajn ĝi finiĝos, la situacio restos la sama. Same kaj eĉ kun ankoraŭ pli granda streĉiteco la registaroj enarmigados kaj malriĉ-

igados kaj malbonigados vin kaj viajn gefilojn, kaj haltigi, antaŭbari tion ĉi neniu helpos vin, se vi mem ne helpos vin.

La helpo do estas ekskluzive en unu: en neniigo de tiu terura konuso de l' perforto, ĉe kiu tiu aŭ tiuj, kiuj prosperis suriri la pinton de tiu ĉi konuso, potencas super la tuta popolo kaj des pli fortike potencas, ju pli kruelaj kaj malhumanaj ili estas, kiel ĝin ni scias laŭ la Napoléonoj, la Nikolaoj I., Bismarkoj, Chamberlainoj, Rodesoj kaj laŭ niaj diktatoroj, regantaj la popolojn en la nomo de la reĝo.

Por neniigo do de tiu ĉi konuso estas sole unu rimedo — la vekiĝo el hipnozo de l' patriotismo.

Komprenu, ke tiun tutan malbonon, de kiu vi suferas, vi mem al vi faras, obeante tiujn instruojn, per kiuj vin trompas la imperiestroj, reĝoj, parlamentanoj, regantoj, militestroj, kapitalistoj, pastraro, verkistoj, artistoj, ĉiuj tiuj, kiuj bezonas ĉi trompon pri l' patriotismo por vivi per viaj laboroj.

Kiu ajn vi estas — Franco, Ruso, Polo, Anglo, Irlandano, Germano, Ĉeĥo, — komprenu, ke ĉiuj viaj efektivaj hominteresoj, kiaj ajn ili estas — terlaboristaj, industriaj, komercaj, artistaj, aŭ sciencaj — ĉiuj ĉi interesoj, same kiel ankaŭ la plezuroj kaj ĝojoj, en nenio kontraŭdiras interesojn de aliaj popoloj aŭ regnoj, kaj ke vi estas kunligitaj per reciproka kunagado, per intereŝanĝo de l' komplezoj, per ĝojo de larĝa frateca unuiĝo, de interŝanĝo de ne sole komercaĵoj, sed pensoj kaj sentoj kun homoj de aliaj popoloj.

Komprenu, ke la demandoj pri tio, kiuj prosperis kapti Vej-Ĥaj-Vej'on, Port-Arturon aŭ Kubon, — via registaro aŭ alia — por vi estas ne sole sendiferencaj, sed ĉiu tia kapto, farita de via registaro, malutilas al vi, ĉar neeviteble sekvigas post si ĉiuspecajn reagojn sur vin de via registaro por devigi vin partopreni je la raboj kaj perfortoj, bezonaj por la kaptoj kaj por tenado de l' kaptitaĵo. Komprenu, ke via vivo neniom povas pliboniĝi de tio, ke Elsaso estos germana aŭ franca, kaj Irlando kaj Polujo — liberaj aŭ sklavigitaj; kies ajn ili estas, vi povas loĝi, kie vi volas; eĉ se vi estus Elsasano, Irlandano aŭ Polo, — do komprenu, ke ĉiu via elmontro de l' patriotismo sole plimalbonigos vian situacion, ĉar tiu sklaviĝo, en kiu sin trovas via popolo, devenis sole de la batalo de l' patriotismoj, kaj ĉiu elmontro de l' patriotismo en unu popolo pligrandigas reagadon kontraŭ ĝi en la alia. Komprenu, ke saviĝi de ĉiuj viaj malfeliĉoj vi povas sole tiam, kiam vi liberiĝos de la forvivinta ideo de patriotismo kaj de la fondita sur ĝi obeemo al la registaroj kaj kiam

kuraĝe eniros en sferon de tiu pli alta ideo de l' frateca unuiĝo de la popoloj, kiu jam delonge enpaŝis en la vivon kaj de ĉiuj flankoj alvokas vin al si.

La homoj sole komprenu, ke ili estas ne filoj de iuj patrolandoj kaj de registaroj, sed filoj de Dio, kaj ke tial ili ne povas esti sklavoj, nek malamikoj de aliaj homoj, — kaj per si mem neniiĝos tiuj sensaĝaj, jam por nenio bezonaj, restintaj el la antikveco, pereigaj institucioj, nomataj la registaroj, kaj ĉiuj tiuj suferoj, perfortoj, malhonorigoj kaj krimoj, kiujn ili kun si portas.

Pirogovo la 10an le majo 1900.

LA MORAVIA KARSTO.

Verkis prof. *Rudolf Fridrich* (Prostějov, Moravio). — (Fino.)

1. Subteraj fluoj kaj rivero Punkva.

Apud Sloup kunfluas la riveretoj Ždárná kaj Luha; la kunigita rivereto baldaŭ malaperas en nevideblaj fendoj de ŝtonego. Tri kilometrojn oriente apud Holštýn perdiĝas sub rulŝtonetoj la rivereto Bílá Voda (440 metroj super la marnivelo); post pluvegoj aŭ dum la printempa degelado ĝi iras pli malproksimen kaj ĵetas sian akvon kun bruego en nigran krateron de l' profundaĵo »Rasovna«. Simile en proksimume dekdu aliaj lokoj en ĉirkaŭaĵo malaperas konstantaj aŭ periodaj akvoj.

Kie ili reaperas? Kvin kilometrojn sude sur la fundo de l' profundegaĵo Macocha oni vidas rivereton fluantan el unu lageto en alian. Jen la subtera rivero Punkva unuiginta la malaperintajn fluojn. Ĝi ree perdiĝas kaj eliras fine 500 metrojn sudokcidente el sub la tero. (347 metrojn super la maro.) Eĉ post longa periodo de sekeco ĝi elfluas kun egala forto atestante grandajn subterajn rezervajn akvejojn.

Laŭ la lastaj esploroj de s-o Absolon trovas sin inter Sloup, Holštýn kaj Macocha tuta labirinto de subteraj krevaĵoj, koridoroj, vastaj kavernoj, kie ekzistas ne sole simpla movado de subaj akvoj, sed kie efektive fluas riveretoj. Punkva fluas ne sole en mallarĝaj kanaloj, sed ankaŭ en tiaj vastaj spacoj dekoraciitaj per stalaktitoj. La tuta kalkoŝtona altaĵo sur plato de proksimume 20 km² kaj en profundeco de 200 metroj ne estas masiva, sed ĝi similas al grandega spongo, sube malsekiĝinta per akvo, en cetera supra parto seka. La tuta

fludirekto de Punkva estas ĝis nun problemo. Punkva fluis antaŭe pli alte kvazaŭ en supra etaĝo kaj lasis kiel postesignon kavaĵojn.

2. *Kavernoj kaj grotoj.*

Vi trovos kavernojn sen »plafona ornamo« publike alireblajn kaj grotojn stalaktitajn, kien kondukos vin gvidisto. Por naturhistoriisto ili enhavas multan ŝtoniĝintan oston de diluvia bestaro.

Apud Sloup estas ŝajna labirinto 500 metrojn longa kaj pli ol 200 metrojn larĝa. Sed la atenta observanto tuj rimarkos iun ordon: vicojn paralelajn kaj laŭlarĝajn. Precipe bela estas la »stalaktita kaverno«, vera perlo. Ĝi estas 30 metrojn alta. Laŭ ilia formo la vigla fantazio de l' rigardantoj donis al stalaktitoj aŭ stalagmitoj diversajn nomojn: monumentoj, akvofalo, gardisto, stalagmita arbareto, orgena preĝejeto, ensorĉita princo kaj simile. Se oni frapas sur stalaktiton nomatan »kurteno«, ĝi sonas kiel arĝenta sonorilo.

Apud vilaĝo Šošůvka estas alia kaverno 269 metrojn longa parte glata, parte kun stalaktitoj. Tuj vi admiros blankan ŝtonan tapiŝon kovrantan murojn kaj teron, tuj riĉan faldaron de la »kurteno«. Sur plafono centoj da delikataj tubetoj, sur planko staras kiel kandeloj dikaj kaj maldikaj stalagmitoj ĝis 1·3 m. de alteco.

En septembro de 1909 s-o Absolon, sindonema esploranto, malkovris kvar kilometrojn pli sude, apud la fina elfluo de Punkva proksime de Macocha novan grandegan groton malfacile atingeblan. Ĝi mezuras 125 metrojn de longeco, 40 m. de larĝeco kaj 20 m. de alteco. Lumigita per reflektoro ĝi la unuan fojon montris al homa okulo sian ĝis tiam kaŝitan belecon. La muro brilanta en nekonata blankeco estas dense kovrita per milionoj da lumetantaj perletoj, el planko leviĝas sennombraj malaltaj stalagmitoj, de la plafono multegaj pintoj de stalaktitoj minacas kuraĝulon, kiu penetris en lokon ĝis nun nevizititan. En la mezo de la ĉambrego staras du grandegulaj kolonoj subtenantaj la pezon de l' plafono.

Ankaŭ el la fundo de Macocha oni povas eniri en kavernojn preskaŭ sen stalaktitoj. Unu el ili havas 152 metrojn de longeco.

Por sekvi la nekonatan fludirekton de Punkva estas necese plimultigi la konon de subteraj spacoj. Grandan praktikan signifon havas la teorio pri paraleleco de krevaĵoj, kiu instruas nin, ke kavernaj spacoj grupiĝas en paralelajn

vicojn, ke sekve la nove trovataj kavernoj estas sole daŭrigo de la jam konataj. Efektive, se oni observas la kavernojn de Sloup, estas evidente, ke ili estas en vicoj, kaj se ni komparas kun ili la direkton de krevaĵoj kaj fendegoj, ni konvinkiĝos, ke ĝi estas tute konforma kun ili.

La pluva akvo senĉese eniĝas tra aluvio en kalkoŝtonan bazon, fluas sur ĝi en kavernojn kaj fendegojn, penetras tiel en subteron, kie ĝi cirkulas en krevaĵoj. En sia irado ĝi plilarĝiĝas, precipe tie, kie la kalkoŝtono estas facile solvebla.

3. »*Závrty*« *kaj abismo Macocha.*

Sur la tuta altaĵo, precipe inter Sloup kaj Macocha, oni ofte renkontas funelajn kavojn, kiujn la loĝantoj nomas »závrty« (enboraĵoj). Ili devenis tie, kie la supra tero falis en subteran kavaĵon. El direkto de tiuj kavoj formantaj ian vicon oni konkludas verŝajnan fluon subteran. Sub la grupo de similaj kavoj norde de Macocha oni suspektas plej vastajn spacojn, almenaŭ ian subteran lagon, kiu trinkigas la riveron Punkva dum tempo de sekeco.

La kavoj »závrty« estas sole antaŭaĵo de l' profundegaĵo Macocha. Ĝi estas profunda sed hela kavego, profunda 136·5 m., larĝa 76—174 metrojn. Ŝtono enĵetita plej fortege ŝajne naĝas kiel malpeza papereto en aero, kaj nur post sep aŭ ok sekundoj falas sur fundon. Tie oni vidas herbejon kaj du lagetojn, kiujn ligas la rivero Punkva. En okcidenta parto deklivas en abismon la plej alta vertikala ŝtonega muro kun elrigardejo por turistoj. Proksime restoracio »Útulna« kun litoj, konstruita de l' »Klubo de bohemaj turistoj«. En la norda flanko estas fiksita »ponteto«, el kie oni povas ĝui ravan vidaĵon sur majestan vertikalan muron.

Nenie oni povas malsupreniri en profundegaĵon sur deklivo; kiu volas atingi la fundon, devas malsuprenigi sin aŭ uzi fortikan ŝnuregan ŝtupetaron. La unuan fojon en 1748 iu kuraĝa kamparano atingis la fundon, poste en 1784, 1856, 1864, 1894, 1898. De 1900 preskaŭ ĉiujare s-o Absolon malsupreniras tien por desegni karton de l' fundo kaj najbaraj kavernoj. La jarcenta antaŭjuĝo, ke homo ne povas pasigi pli longan tempon en Macocha ne malutilante sian sanon, apartenas al pasinto. La lastaj ekspedicioj noktis tie ofte.

Kiel Macocha devenis? Sur la loko de la nuna abismo estis antaŭe granda subtera kavaĵo, kies plafono perdinte apogon enfalis.

Oni serĉas la enigman fludirekton de Punkva. Enirinte apud elfluo oni volas penetri ĝis en profundegaĵon. Ĝis nun oni ne sukcesis, ĉar mankas multekostaj aparatoj, bonaj pumpiloj kaj skafandro.

Ĉu oni haltos antaŭ tiu problemo? Ne, diras s-o Absolon. »Estas en la mondo problemoj, al kiuj multaj generacioj devas klopode prepari scion kaj sperton, ĝis fine venos la rezultato de longaj penadoj: la nepo rikoltos, kie lia avo semis. Venos la tago, kiam nek anguleto de la problema subtero inter Sloup kaj Macocha estos nekonata.«

INFORMACE A DOKUMENTY.

Počet propagačních spolků esperantistů v l. 1888—1909. Dle statistického materiálu, shromážděného ústřední kanceláři esperantistů (Centra oficejo esperantista) v Paříži byl počet spolků propagujících esperanto v různých letech takovýto:

1888—1	1893—15	1898—37	1903—113	1908—1266
1889—3	1894—19	1899—32	1904—186	1909—1447
1890—3	1895—18	1900—26	1905—308	
1891—7	1896—24	1901—26	1906—474	
1892—13	1897—30	1902—44	1907—721	

Prvé spolky esper. vznikly v Německu (roku 1888), Bulharsku (1889), Rusku (1889), Švédsku (1891), Španělsku (1893), Francii (1894), Dánsku (1897), Belgii (1898), Rakousko-Uhersku (1901) a Sev. Americe (1901). V Rakousko-Uhersku existoval roku 1901—1 spolek (v Brně), 1902—3, 1903—3, 1904—11, 1905—16, 1906—30, 1907—56, 1908—92, 1909—164. Z 1447 spolků esp., existujících r. 1909, bylo v Evropě 1145, Americe 250, Asii 28, Africe 12 a Oceanii 12. Nejvíce spolků esp. bylo toho roku (1909) ve Francii (249), Německu (222), Anglii (175), Sev. Americe (175), Rakousko-Uhersku (164) a Rusku (85); nejméně spolků bylo v Norvéžsku (4) a Portugalsku (3). V Evropě jsou spolky esp. v 16 státech. *Hkb.*

Statistika esperantské literatury provedena byla ústřední kanceláři esperantistů v Paříži dle stavu z posledního dne r. 1909. a uveřejněna byla v letošním červnovém čísle oficielního orgánu kanceláře (»Oficiala gazeto esperantista«, III., 1). Dle této statistiky vyšlo do konce r. 1909 celkem 1372 knihy o esperantu nebo v esperantu. Z toho připadá na díla informační a propagační 307, na učebné pomůcky 510, na belletrii a poesii 268, na díla odborná a vědecká 287. Učebnice esperanta vyšly v 29 jazycích (angl., armen., čes., bulh., dán., esp., eston., fin., franc., něm., řec., hebrej., špaň., holand., maď., isl., ital., jap., katal., chorv., lotyš., litev., norv., pol., portugal., rumun., rus., sloven., švéd.); nejvíce učebnic esperanta vyšlo v ruštině (55), řečtině (44), francouzštině (43), angličině (43), němčině (30), esperantu (28), španělštině (27), polštině (24), maďarštině (16) a italštině (13); v češtině vyšlo 6 učebnic. Slovníků vydáno bylo 76. V esperantské belletrii je 48 děl původních a překlady z 20 jazyků (angl., arab., armén., čes., bulh., dán., flander., franc., něm., řec., špaň., hol., maď.,

ital., katalán., lat., norv., pol., rus., švéd.); nejvíce esp. překladů je z jazyka francouzského (58), ruského (27), polského (24), anglického (21) a německého (18); z češtiny jsou přeložena 2 díla. Z děl odborných a vědeckých věnováno je 124 krásným uměním, fotografii a hudbě, 39 užitým vědám, 35 sociálním vědám a právu, 30 dějepisu, zeměpisu a cestovatelství, 28 náboženství, 18 čistým vědám, 8 filosofii a 5 filologii. *Hkb.*

Vzrůst esperantistického časopisectva od r. 1889 do r. 1909. Jak zaznamenává »Oficiala gazeto esperantista« (III, 1) byl počet časopisů esp. v různých letech takovýto:

1889—2	1893—1	1897—2	1901—3	1905—36	1909—106
1890—3	1894—1	1898—3	1902—12	1906—45	
1891—2	1895—2	1899—3	1903—21	1907—61	
1892—1	1896—2	1900—3	1904—26	1908—99	

Až do roku 1894 vycházely esperantské časopisy pouze v Německu a Bulharsku. Teprve od r. 1895 vycházejí esp. časopisy také ve Švédsku, od r. 1898 také ve Francii a od r. 1900 v Rakousko-Uhersku (prvý na Moravě: Internacia revuo). Počet časopisů esp. vycházejících v Rakousko-Uhersku byl tento: roku 1900—1 časopis, 1901—1, 1902—4, 1903—5, 1904—2, 1905—3, 1906—2, 1907—5, 1908—11, 1909—13. Ze 106 časopisů, vycházejících r. 1909 vycházelo v Evropě 84 (v 17 státech), Americe 15, Asii 4, Africe 2 a Oceanii 1. Nejvíce časopisů esp. vycházelo toho roku (1909) ve Francii (22), Německu (13), Rakousko-Uhersku (13) a Sev. Americe (11). *Hkb.*

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Literatura almanako de Lingvo internacia 1910. Paris. Presa esperantista societo. Prezo fr. 3·— (por abonantoj de »L. i.« fr. 2·50) (pĝ. 73.) — Tiu ĉi libra premio de »L. i.« al la nunjaraj abonintoj estas plene dediĉita al esper. poezio enhavante 27 tre diversvalorajn poemojn originale verkitajn aŭ tradukitajn de konataj esperantistoj, kies fotografaĵoj estas aldonitaj. La ekstera aranĝo de la verko estas bela. *Hkb.*

La kometo de Halley de *S. Blajko.* El rusa lingvo esperantigis inĝ. *W. Šmurlo.* Eldonis *Ad. Thalwitzer,* Kötzschenbroda-Dresden, Germanujo. Prezo Sm 0·5 (pĝ. 21). — Bona astronomia verketo, el kiu oni povas ĉerpi multajn sciojn ne sole pri la kometo de Halley, sed pri la kometoj ĝenerale, tial ĝi certe estos legata eĉ nun, kiam malaperis la konata kometo kaj kun ĝi la danĝero atendita de multaj timemuloj. *Hkb.*

La vizito en la karcero. Humoraĵo de *Ernst Eckstein.* El la germana lingvo tradukis *Rud. Freericks.* Ĉe *Rud. Freericks,* Düsseldorf, Helmholtzstr. 7. Prezo Sm 0·30 (pĝ. 47.) — Diversaj ridindaj kutimoj de la profesoroj donas al la studentoj okazon por petolaj ŝercoj, kies priskribo prezentas ĉiam amuzantan humoraĵon. Tiaspeca estas ankaŭ tiu ĉi studenta historio, kies ĉefaj personoj estas prof. dr. Heinzerling, elparolanta la vokalojn i kaj u kiel e kaj o, kaj studento Rumpf scianta bonege imiti la elparoladon kaj pozon de sia direktoro. *Hkb.*

Gestudentaj interesoj tuthomaraj. Oficiala organo de la »Universala idea societo internacia de progresema gestudentaro«. Redakcio: Luhačovice, Moravio-Aŭstrio (Joža Mareš).

Administracio: Kraków, Floriańska 1, 10, Galicio-Aŭstrio (Ed. Žatecky). Abonpago 2 Sm. — En la jaro 1909. fondiĝis »Ĉiostudenta asocio« celanta kunigi la progreseman inteligentularon de ĉiuj nacioj sur bazo de libera penso, pacifismo, abstinentismo kaj esperantismo kaj vastigi en ĝi la solidarecon kaj fratecon. Oficiala organo de tiu ĉi societo estas »G. i. th.« La iniciatintoj estas entreprenemaj, viglaj laborantoj, kiuj sentime laboras por la montrita celo tre malfacile atingebla. — La 1-a n-o de la nova gazeto estas dediĉita plene al societaj informoj, inter kiuj estas regularo de la societo. *B.*

Le Monde espérantiste. Red. & adm.: Paris, Rue Sophie-Germain, Francujo. Jarabono Sm 0·80 (luksa eldono Sm 1·60). — Malmultekosta propaganda gazeto en la franca lingvo. — La lastaj numeroj (III, 8, 9) enhavas en la franca parto akrajn polemikojn (precipe kontraŭ s-o Bourlet), en la esperanta parto artikolon pri Lingva komitato kaj resuman historion pri la peralfabeta transkribado de la homa penso. *Rd.*

Ricevitaj gazetoj. — *Oficiala gazeto esperantista* (III, 1, 2, 3): Ĝenerala statistiko pri la propagando de esperanto. Pri ad, aliu, alia, iĝ, da, tra. Kelkaj notetoj pri la uzado de prepozicioj. Pri al. — *Lingvo internacia* (XV, 6, 7, 8): Unueco donas forton. Utileco de la esp. por la blinduloj. — *La Revuo* (IV, 11, 12; V, 1): Multajn lingvojn lerni (Nietzsche). — *Esperanto* (79, 81, 82, 83-84): Infannaskado kaj civilizeco. Pri kalendara reformo. Unua kongreso de UEA. — *La Duonmonata* (I, 20). — *Universo* (I, 1). — *Nova sento* (II, 14). — *Internacia pedagogia revuo* (I, 3). — *Internacia socia revuo* (IV, 6, 7, 8, 9): Raporto de Leo N. Tolstoj al kongreso de paco en Stockholm. La armigado de la grandaj nacioj kaj la laboristaro. Tiel parolu al infanoj (el »Volná myšlenka«). — *Libera penso* (9): B. Björnson. — *La Simbolo* (II, 5, 6): El Ĉeĥlando. Bildoj pri Zamenhof. — *Voĉo de kuracistoj* (III, 7, 8, 9): Principoj, laŭ kiuj oni devas kuraci apendiciton (laŭ »Čas. čes. lékařů«). La okulvitroj kun duobla fokuso. — *Gestudentaj interesoj* (I, 1). — *La Barbiro* (II, 2). — *Juna esperantisto* (VIII, 6, 7, 8). — *Eŭropa kristana celado.* — *Juneco* (I, 8, 9): Esp. en la junularo. — *The British Esperantist* (VI, 67, 68, 69): Esp.-tago en la japanbrita ekspozicio. — *Germana esperantisto* (VII, 7, 8-9): Ni konservu la pacon. Ein neuer Kulturfaktor. La rolo de la gazetaro. Iom pli ĝusta kritiko! — *Informaj raportoj* (IV, 7-8, 9): Ĉu »bohema« aŭ »ĉeĥa«? Decidoj de Akademio. Kiamaniere interrilatas internacia lingvo kun la ĝenerala disvolviĝo de lingvoj? Al niaj ĉeĥaj samideanoj! Proponoj al Akademio. Propagando ĉe la gazetaro. — *Pola esperantisto* (III, 6-7, 8): Pri kalendara reformo. — *Le Monde espérantiste* (III, 8, 9). — *Germana esperanto-gazeto* (III, 13, 14, 15, 16, 17): Esp. politekniko. — *Eĥo esperantista* (V, 49, 50). — *Rund um die Welt* (I, 7, 8-9): Zur Geschichte des Esp. und das intern. Leben. Esp. in Böhmen. — *Belga esperantisto* (II, 9, 10). — *La Holanda pioniro* (II, 9, 10, 11, 12). — *Norvega esperantisto* (II, 4). — *Itala esperantisto* (I, 1). — *Kataluna esperantisto* (I, 3). — *La Suno hispana* (VII, 78). — *La Ondo de esperanto* (II, 6-7): Parolado de Dro L. L. Zamenhof en konferenco en Petersburg. — *Rumana esperantisto* (II, 7-9). — *Lumo* (III, 8-9, 10). — *Serba esperantisto* (I, 2). — *Greklingva esperantisto* (II, 5, 6, 7). — *Paris-esperanto* (IV, 40). — *L' Informilo* (8). — *Normanda stelo* (III, 7). — *Sarta stelo* (III, 24). — *Norda gazeto* (III, 19). — *Brazila esperantisto* (III, 1, 2). — *Japana esperantisto* (V, 4-5). — *La Du steloj* (II, 11-12; III, 1-2). — *Verda stelo* (III, 6, 7, 8). — *Esperanta gazeto* (II, 19). — *Idealisto* (I, 4): Ideali. Lektado. La virino. Pri animal-protekto. Pri alkoholo. *Rd.*

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

Redaktoro: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097. — Eldonanto: Jan Iglauer, Praha III, 495. — Presejo: »Politika«, Praha. — Bohemujo-Aŭstrio.